

Numero: 325.  
Junio 2019.

27-a jarkolekto

# VESPERTO

## Literaturaj folioj



Redaktanto  
Apáti Kovács Béla  
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400  
Telefona: 06/20/497-03-64  
Retadreso: [apatikb111@gmail.com](mailto:apatikb111@gmail.com)  
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO  
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

## Kial Esperanto?

Ĉu ĝi estas nur lingvo aŭ alia? Tio ĉi estas malfacila demando. Bedaŭrinde ĉefe en Hungario multaj geesperantistoj pensas, nur maldekstruloj rajtas uzi tiun ĉi lingvon. Ili laŭte diradas: Esperanto estas la lingvo de l' paco. Ĝi estas kontraŭ naciismo.

Fakte dum la naskiĝo de la zamenhofa lingvo en la 19. jarcento disvastiĝis la ideo de la homaranismo kaj ankaŭ d-ro Zamenhof estis ĝia adepto. La senco de la homaranismo ĉiu homo apartenas al unu familio.

Ĝi estas bela ideo kaj ne forĵetinda. Tion proprigis la socialistoj kaj komunistoj, kvazaŭ nur ili estus la unusola heredantoj kaj kiu ne apartenas al ilia rondo, tiu estas malamiko.

Mi estas konvinkita, nia majstro d-ro Zamenhof kreis ne nur por ili Esperanton.

Tiutempe Bialistoko estis multlingva urbo. Surstrate oni povis aŭdi rusan, polan, germanan, jidan parolon kaj la homoj ofte kvereliĝis pro lingvaj miskomprenoj.

Laŭ mi komence ĝi estis la motoro de Esperanto en la kapo de la juna Zamenhof. Li deziris krei lingvon por helpi la diverslingvajn homojn, por ke ili pli facile komprenu unu la alian en la ĉiutaga vivo.

Ni geesperantistoj devis reiri al la juna Zamenhof kaj ni devus sekvi tiun ĉi vidpunkton, por ke ni komprenu unu la alian helpe de Esperanto.


Ni forĵetu la idealismajn vortojn kaj frazojn! Esperanto restu nur utila pontolingvo, kiu plifaciligas la homan komunikadon.

Al Esperanto ne ligiĝu partioj kaj ĉefe la partioj ne manifestu, ke ĉi lingvo estas nur ilia propraĵo.

Komprenble Esperanton ĉiu rajtas uzi por diversaj celoj, kie estas necesa la kono de iu fremda lingvo.

Esperanto povus fariĝi la helplingvo de la homaro. Per ĝia helpo povus fali la lingvaj muroj, kiuj ofte disigas la homojn.

— Redaktanto —



## Ek al Esperantio

La junulino staris apud la aŭtovojo. Ŝi atendis.  
Jam vesperiĝis kaj estis tre varme.

La aŭtoj senhalte veturis preter ŝi. Tio ne tro interesis la junulinon. Ŝi atendis pacience kaj revante ŝi rigardis en la malproksimon.

Subite ruĝa aŭto Volvo bremsis apud ŝi. La ŝoforo interesiĝante demandis:

— Kien ĉarmulino?

La junulino iris pli proksime al la aŭto kaj diris:

— Mi deziras vojaĝi al Esperantio. Ĉu vi veturigis min tien?

— Vi havas bonŝancon, ĉarmulino. Mi ĝuste veturas tien. Bonvolu enaŭtomobiliĝi.

La junulino volonte akceptis la inviton.

Ene en la aŭto estis agrabla klimato kaj silenta muziko estis aŭdebla.

Kiam ŝi sidiĝis, ĵetis rapidan rigardon al la viro kaj ŝi diris:

— Dankon.

— Tre volonte. Mi ĝojas, ke mi renkontis iun, kiu vojaĝas al Esperantio. Ĉu vi jam estis tie?

La junulino ekridetis.

— Tio ĉi estos mia unua vojaĝo tien. Mi ankoraŭ neniam estis en Esperantio.

— Ankaŭ mi nun vojaĝas tien unufoje. Onidire ĝi estas tre belega.

— Ankaŭ mi same pensas. En iu tago ĉiuj homoj devos vojaĝi al Esperantio. Ĝi estas la lando de l' espero. Mia amikino, kiu jam vivas tie de post jaroj telefonis, ke en Esperantio ĉiuj homoj estas feliĉaj kaj kontentaj. Ŝi proponis al mi la vojaĝon.

— Mi vidis mallongan filmeton pri ĝi en iu televidoprogramo. Ĝi vekis mian interesiĝon — aldonis la viro.

— Kiom longe ni veturos ĝis Esperantio? — demandis scivoleme la junulino.

— Mi ne scias. Laŭ mi tio dependas de multaj aferoj. Se la tien kondukanta ŝoseo estos pretigita perfekte, tiam ni alvenos rapide.

Neatendite la junulino ekkriis feliĉe:

— Rigardu, tiuj bluj montoj jam estas en Esperantio.

— Eble ĉarmulino — diris la viro kaj li metis sian piedon al la gaspedalo.

— Ŝaŝa —



Sen orela– ĈULJA laŭ Torlaka lingvo  
parolata en Knjaževac /iama Gurgusovac /  
ĉirkaŭaĵo –Timoka regiono/la orienta parto de  
Serbio

## ĈULJA

Stanimir estis bona muzikanto.Kiam li ekmuzikis  
per sakfluto kaj junuloj kaj maljunuloj  
eniras rondodancon dancante ĝissate.

Jes, li estis tiom bela.Tial ĉiuj knabinoj amis lin.

Do, iun tagon li elektis por si knabinon. Tiun jes  
,ĝuste ĉi tiun! Savka! Jes ŝi estis belulino sed havis  
siajn muŝetojn en la kapo.



Lia patrino kaj patro ne estis kontentaj pro tio  
ĉar ili malpermesis al li elekti ŝin. Sed li edziĝis al  
ŝi.

De la unua tago de ilia geedzeco Savka kaj ŝia  
bopatrino ekmilitis.

Ambaŭ estis je sia maniero strangaj.

Stanimir iris perlabori en vilaĝo muzikante sed  
kiam li estis revenonta hejmen ambaŭ inoj premas  
lin la edzino siaflanke, la patrino aliflanke. Ambaŭ  
plendis kaj klaĉis antaŭ li kontraŭ unu la alia.

“Al domo mi ne emas reveni”

lametis li al unu muzikanto kun kiu li  
ĉiunokte muzikis .

Venis infano. Li pensis ke la bebo trankviligos la  
virinojn. Sed okazis pli malbone.



Iun tagon Stanimir revenis  
hejmen post muzikado.

Li vidis la patrinojn staranta sub pendanta vinbera  
vito/ troviĝanta ĉe la enirpordo de la domo/. Ŝi  
estis silenta kaj pufeca. La  
patrino estis nek salutanta lin kiel estis kutime nek  
aŭdiĝis infano.

Li ne vidis la edzinojn. Nek ŝi estis en la  
domokorto nek je lia vido. ...ion  
malbonan li antaŭsentis en sia koro..



– Kie estas Savka? – demandis li la patron.  
La patro silentis kaj turniĝis al patrino ne  
salutante lin laŭkutime.

La patro staris apud la patrino metante surkapon  
ŝian kaptukon dirante “Jen via Savka!”

La patrino kapo sangoplenas kaj sen dekstra  
orelo!

ĈULJA! ekpensis li  
teruranta. Savka formordis la orelon dente!!!

Li mutis nepovanta kredi ĉu li sonĝis tian  
teruron. Larmoj malsuprenfluis liajn vangojn.

Li ne viŝis ilin. Nur mane kaŝis la  
vizaĝon, pro la honto li ekploris kaj la  
panjon surbruston premis.

La ĉulja ne estis el Jakovac vilaĝo nek estis  
Savka sed el najbara vojeto!

La rakonton pri ili trarakontis al mi miaj gepatroj.

Verkis origine laŭ turlaka dialekto Dro–  
Dragica Milenković

Esperantigis Mirić Jadranka –Zaječar – SERBIO





# Poezio

Sándor Petőfi

## Paŭlo Prokrasty

Kiel princo malbenita  
trans la Ocean' Fabela,  
sola vivas Paŭl' Prokrasty  
grumble sur bien' nobela.

Ho, se estus edzineti,  
ŝanĝus sin la vivmanier'...  
Interrompis Paŭl' Prokrasty:  
"Eh, ne urĝas la afer'!"

De l' kaduka dom' faladas  
la mortero, kaj la vento  
dio scias kie kuras  
kun la peco de tegmento.  
Riparigu, ĉar rigardos  
tra l' plafono la ĉiel'...  
Interrompis Paŭl' Prokrasty:  
"Eh, ne urĝas la afer'!"

La ĝardeno dezertiĝis,  
sed ja floras agrogrundo:  
ĉia spec' de sovaĝfloroj  
tie pompas en abundo.  
Kial dormas laboristoj,  
pigras la plugila fer'?  
Interrompis Paŭl' Prokrasty:  
"Eh, ne urĝas la afer'!"

Kaj la vestoj! L' olda jako  
kaj trivita pantalono  
taŭgus por araneaĵo  
jam nur en necesbezono.  
Sendu voki la tajloron,  
drap' atendas en kamer'...  
Interrompis Paŭl' Prokrasty:  
"Eh, ne urĝas la afer'!"

Tiel li tra l' viv' vegetas.  
Kvankam al li de l' praavo  
restis heredaĵo riĉa,  
ĉiam estis li sen havo.  
Sed ne estas lia kulpo:  
naskis lin hungara ter',  
kie estas pradevizo:  
"Eh, ne urĝas la afer'!"

*Kalocsay, Kálmán*



Sándor Kányádi

## Sur la lago

Moskito flugas super la lago,  
La rano magias moskiton  
Ĝi vartas, ĝi forflugos  
Antaŭ la ŝtonon.  
- Forflugu, venu, venu,  
ne timu min, moskito!  
Mi manĝis al vi  
pli granda moskito.  
Tiel instigas la moskiton,  
la malsata rano,  
kiam su lagon venas  
la ombro de cikonio.  
Ja la rano ne vidas, aŭdas:  
- Ne devas timi!  
Ham, buŝkaptas, sed  
Mi lernigas drivi.  
Ĝi saltas kaj la moskito  
kvazaŭ ne estos.  
Ja la cikonio ne vane  
la lago estos.  
Beko fulmas, al la klingo,  
klakas, al la vipo:  
kaptas la malsatan ranon,  
Kune kun la moskito.

*Sipos Ferenc Norbert*



# Por infanoj



## Jano kaj la belega reĝidino

Kaj estis, kaj ne estis en belega reĝlando vivis belega reĝidino. Ŝia beleco estis konata en la tuta terĝlobo.

La reĝo estis fiera je sia filineto kaj li deziris defendi ŝin, eĉ de la sunbrilo kaj vento.

La reĝidino estis gardata pere de naŭdek naŭ bravuloj. Tage kaj nokte ili staris antaŭ la pordo de la reĝidino. Ili neniu lasis eniri ŝian ĉambron sen la permeso de la reĝo.

Inter la bravuloj estis junulo Jano. Antaŭ nelonge estis varbita gardi la reĝidino. Tiu junulo tuj enamiĝis al la reĝidino. Kvankam tio estis malpermesita.



La reĝo manifestis, se iu bravulo ĵetas rigardon al lia filineto, tiun li senkapigos. Tial, se la reĝidino ekaperis, la bravuloj tuj devis malfermi la okulojn.

Jano estis novbakita bravulo kaj krome li estis tre scivolema. Sekrete li ĵetis rigardon al la reĝidino.

Apenaŭ li ekvidis ŝin, li tuj fariĝis enamiĝanta kaj ekde tiu momento li ne povis liberiĝi de la penso, kel li edzinigos la reĝidino.

Bonŝance neniu rimarkis, ke li ne fermis la okulojn. La aliaj bravuloj ĉiuj estis obeemaj kaj ili vidis nenion.

Jano revadis pri la reĝidino dum la tuta tago, eĉ ankaŭ nokte. Li ne povis endormiĝi. Senĉese li devis pensi pri ŝi.

En iu nokto li estis starigita gardi la filinon de la reĝo. La aliaj naŭdek ok bravuloj deĵoris aliloke en la palaco.

Kiam ĉio silentiĝis, Jano ne povis elteni por ke li ne eniru en la ĉambron de la reĝidino.

Li enŝteliĝis por rigardi, kiel dormas sia karulino.

En la ĉambro Jano hazarde faletis kaj je la bruo vekigi la reĝidino.

Ŝi tuj volis kriegi, peti helpon. Dank' al Dio Jano rapide rekonis la situacion.

— Trankviliĝu, belega reĝidino. Ne timu! Nur kato ensaltis la ĉambron kaj ĝi faris la bruon.

En la lunlumo la reĝidino ekvidis sian bravulon kaj ŝi iomete trankviliĝis.

Sed estis problemo. Jano ekvidis la reĝidino kaj li estis anoncinta la kazon al la reĝo matene.

Por Jano tio ĉi signifus la finon, ĉar post la anonco la ekzekutisto tuj senkapigus lin.

Tial li komencis petegi:

— Kara belega reĝidino, ne menciuj al via reĝa patro, ke ĉi nokte ni renkontiĝis. Se li sciigos pri ĝi, tiam mi mortos.

La reĝidino promesis, ke ŝi silentos pri la nokta aventuro.

Certe jam vi scias, kial ŝi faris tiun ĉi promeson? La respondo estas facila, ĉar Jano ekplaĉis al ŝi.

Ekde tiu ĉi nokto la du gejunuloj ĉiam serĉis la okazon por renkontiĝi. Tio ĉi ĉefe povis okazi nokte, kiam Jano estis starigita antaŭ la pordon.

Post iom da tempo Jano petis la kapitanon de la bravuloj, ke li staru nokte tie. Tio ĉi fariĝis suspektinda por la kapitano.

Li decidis kaŝobservi sian subulon, kial li volas deĵori tiom ofte.

— Bone Jano, hodiaŭ nokte vis taros antaŭ la pordo de la reĝidino. Sed estu ĉio en ordo! Vi scias ĝi estas la plej grava deĵoro. Se vi eraras, tio signifas vian morton.

La juna bravulo apenaŭ atendis la nokton. Nun li denove povos ekvidi la reĝidino, eĉ ili povos babiladi.

Alvenis la nokto kaj li alvenis al la pordo akurate. Lia kamarado foriris kaj li restis sola.

Kiam pasis noktomezo li ekaŭdis la voĉon de la reĝidino:

— Jano, envenu! Nun jam ĉiu dormas en la palaco.

Li eniris al la kara invito kaj la du geamantoj ĉirkaŭbrakumis unu la alian.


Tion atendis la kapitano de la bravuloj. Kiel rabia hundaĉo alarmis la tutan palacon.

— Jano estas ene ĉe la belega reĝidino.

Venis tuj mem la reĝo por vidi la skandalon. Tio ĉi estis la fino por Jano. Matene la reĝo senkapigos lin

— daŭrigota —

— Verkis: Apáti Kovács Béla —





# Somerumado

# Somerumado

